

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorieta de Bilbao, 5.
Julio Mangada Rosenörn.—MADRID

II^a
JARO

NUM. IV.^a.—ABRILLO 1929

II^a
JARO



Asturias.—Preĝejo de Sankta Cristina de Lena.

PRI ASTURIAS

Jam sur ĉi tiu gazeto (n-roj de Julio kaj de Aŭgusto-Septembro. 1928), oni parolis pri prapatraj loĝantoj de Hispanujo pri-traktante kompletan homskeleto elkovritan en *Colombres* (Asturias), kiu apartenas al la meza neolita periodo kaj tipo *Cro-Magnon*, kaj aliajn eltrovitaĵojn de tiu astura loko kaj eĉ de la tutmondfamaj grotoj de Altamira (Santander, najbara regiono de Asturias), per kiuj oni konstatas la grandan altgradan kulturon ĉe Hispanujo dum tiu periodo, kaj estas rimarkinde ke samaj eltrovitaĵoj francaj apartenas al la lasta neolita periodo; pro kio prave oni povas diri, ke tia kulturo pasis de la kantabra hispana regiono al Francujo. Por vidigi tian altgradan kulturon estas rimarkinde konstati, ke la kranio de la *colombres'a* skeleto prezentas la truon de la trepanado.

Ne devenas la asturoj de la fabela *Astyr*, militpaĝio de *Memnon*, forkurinto de la milito de *Troja*, kiel kaprice certigas iuj historiistoj sin bazante sur tri versoj de *Silio Italico*, kaj eĉ farante *Astyr'on Kreta Jupitero* kaj *Trimegista Mercurio*, filo de *Osiris*', frato de *Herkuleso*, bofilo de *Agenor'* kaj *Agerion'*, edzo unue de *Eŭropo*, poste de la sibilo *Eritreo*, patro de *Minos'*, kaj de *Radumanto*, kaj estro de longedaŭra astura dinastio; tute ne, la indiĝenoj de ĉi tiu regiono sin alnomis *asturoj* kaŭze de la enlanda rivero *Astura*, kiun poste oni alnomis *Extula* kaj *Stola*, kaj fine *Ezla*; tiel sin alnomis ĉiuj triboj loĝantaj de la Kantabra Maro al la rivero *Duero*, kiu apartigis ilin de la *Vetones'*, kiel apartigis ilin de la *Vacceos'*, kaj *Galaikos'* la rivero *Ezla* kaj abruptaj montaroj respektive. Sed la plej militemaj kaj sen-dependemaj la transmontaj asturoj, kiuj loĝis en la nuntempa *Asturias*, enfermita de la montoj *Erbasios* (hodiaŭ *Arvas*).

En ĉi tiun teritorion ankaŭ venis, elpelite de aliaj teritorioj la *liguroj* de Italujo, kaj ĉi tiuj, timante la marekskursojn de aliaj gentoj, unue okupis la abruptaĵojn de la montoj, kaj fine la marbordon, fariĝante ankaŭ navigantoj, laŭ versoj de *Festo Avieno* priskribantaj la hispanajn marbordojn. Ankaŭ aperas ĉi tiu itala gento sur la priskribo de la *kartagano Himilcon* (445 jaroj antaŭ Kristo) pri lia vojaĝo ĉirkaŭ la hispana preskaŭinsulo, kaj kune kun la *liguroj* li citas la asturojn kaj *silorojn*. Sen-dube la unuaj vivis pace kun la indiĝenoj (asturoj). Iuj opinias

ankaŭ ke la keltoj estis la unuaj loĝantoj; aliaj opinias, ke la keltoj estis invadanta ĝento submetanta la indiĝenoj, kaj ĉi tiuj opinioj estas pravaj, ĉar la keltoj, fratoj de la iberoj, elpelitaj el la montaroj najbaraj de la Himalajo (*Azio*) de la indiĝenoj de tiu teritorio, reveninte al nuna *Georgio* (de kie ili eliris) kaj ne trovinte la fratojn, sekvis ĉi ties vojon, trairis Eŭropon kaj alvenis al ĝia okcidenta parto same, kiel la iberoj.

Ĉiuj antikvaj historiistoj kaj geografiistoj priskribas la asturojn same, kiel la kantabrojn, simplaj kaj krudaj pri iliaj kutimoj, pli spiritemaj kaj multe pli ĝentilaj ol la ceteraj idolanoj (kvankam, spite de sia spiriteco, ili ne atingis la Diunuecon), malriĉaj kaj sobraj malgraŭ la grandega riĉeco de la lando de minerala vegetara kaj brutaj vidpunktoj, anstataŭante la panon per kastanoj, la vinon per la pomvino, la oleon per la porkograso; ili fariĝis navigantoj per krudaj ledaj barkoj, kaj kuraĝe ili krozis la marondojn per tiaj barkoj, mirigante aliajn gentojn: ili estis sociemaj kaj konsentemaj, noblaj kaj lojalaj, sed timigaj, kuraĝege militemaj kontraŭ la fremduloj, ĉar ĉi ties ambicion ili spertadis.

La asturoj restadis fremdaj je la politiko de *Kartago* kaj de *Romo*, ĝuante liberecon, kiun la tutmondfame heroaj urboj *Sagunto* kaj *Numancia*, kaj la herooj *Viriato* kaj *Sertorio* bravege sed malfeliĉe defendis. Tiel okazis dum *Romo* subtenadis militojn kontraŭ *Kartago* kaj siaj potencaj spertaj ribelantaj militestroj; sed kiam *Romo* trafis la internan trankvilon, kaj venkinte *Kartagon*, pretekstante malbonon de la militekskursoj de asturoj kaj kantabroj en la najbaraĵn gentojn submetitajn de la romanoj, kaj kvankam *Estatilio Taŭro* haltigis la militekskursojn, la romanoj ekmilitis serioze kontraŭ asturoj, kantabroj kaj *galaikoj*, kaj tiel bravege ĉi tiuj kontraŭstaris la romajn militistarojn, ke Aŭgusto ektimis kaj tial opiniis necese preni sur sin la komandon de la legioj por fini la reziston, sed ĉi tiu estis tiel vigla, granda kaj speciala, ke la milito longedaŭris kaj Aŭgusto malsana kaŭze de tio rezignis la komandon. Oni dividis la militistaron, en kombino kun la mararmeo, laŭ tri korpusoj: unu kontraŭ la kantabroj, alia kontraŭ la *galaikoj*, la tria kontraŭ la asturoj. Dum la unua venkis apud *Vellica* la kantabrojn kaj ĉi tiuj, fine ĉirkaŭitaj de la romanoj ĉe la monto *Vindio*, referis morti antaŭ ol servuti kaj same okazis al la *galaikoj* en la monto *Medulio* ĉe la rivero *Miño*, la asturoj kuraĝis ataki surprize

de tri flankoj samtempe la legiojn de *Tito Carisio*, planinte la triopan atakon tre sperte por kio ili formis tri korpusojn; sed bedaŭrinde la *trigecinoj*, gento amika de la asturoj, ĉi tiujn perfidis sciigante la planon al *Carisio*, kiu surprizis kaj venkis la asturojn kvankam kun teruraj perdoj. La asturoj rifuĝiĝis en la urbo *Lancia*, kie ili, post heroa rezistado, kapitulacis pro absoluta manko da vivrimedoj. Spite de la teruraĵoj al ili, de la sklavigo, de la translokigo de tutaj loĝantaroj de la montoj al la plataĵetoj kaj valoj, neniam la asturoj absolute sin submetis al la romanoj kaj ofte ribelis. Du jarojn de post la venko de *Carisio*, la asturoj amase unuanime ribelis, kaj samtempe la kantabraj fratoj kontraŭ *Cayo Furnio*; sed la romanoj kruelege per la fero kaj la fajro revenkis unu kaj alian, restariginte terure antaŭe la disciplinon en la romanajn legiojn, kiujn la kuraĝo de asturoj kaj kantabroj malkuraĝiĝis.

Versajne la asturoj cedis, ĉar, pro sia karaktero kaj la travivitaj spertoj, pro sia fideleco al traktatoj, pro la saĝeco de la imperiestro respektanta iliajn sentojn de libereco, kaj pro la singardemo de *Tiberio* destinanta potencon kaj multenombrian militistaron al ĉi tiu teritorio, ili konsciis pli konvene vivi paco; sed tamen la roma civilizacio ne enradikiĝis en la asturoj, kaj kvankam sur la promontoro Torres, ĉe la marbordo inter *Gijon* kaj *Aviles*, la romanoj starigis tri famajn altarojn (kvazaŭ grandajn piramidojn) *Sestianas* je la honoro de Aŭgusto, estas certe ke ĉe la lando ne estis grandaj konstruaĵoj romanaj, ne floris iu romana urbo. La tri altarojn, laŭ plej fundamentitaj opinioj, oni starigis je la 762^a jaro de la fondo de Romo, kaj ilia nomo devenas de *L. Sestio*, en kiun Aŭgusto rezignis sian XI^{an} aŭtoritatecon (1).

(1) En *Carrio*, ĉe la grafo de *Peñalva*, en la altaro de la kapelo estas grandega ŝtonplako kun gravurita skribaĵo di ranta :

Imp. Coesari Augusto Divi F.

Cos. XIII. Imp. XX. PON. MAX.

PATR. PATRLE TRIB. POT. XXXII

SACRUM

Laŭ aluditaj historiistoj kaj la hispana *Pomponio Mela*, nur staris la urbo *Noega*, apud la maro ĉe la landlimo inter asturoj kaj kantabroj, kaj fluis la rivero *Salia* (hodiaŭ *Sella*); ĉe la kontraŭa parto, najbare de la *galaikoj*, fluis la riveroj *Navilubion* (eble la hodiaŭa *Navia*) kaj *Naelo* (hodiaŭ *Nalon*), starante ankau ĉe la marbordo la urbo *Flavo-Navia*, kiu konservas la duan parton de la nomo. La *pesicos* kaj *zoelas* estis gentoj, triboj loĝantaj la unuaj inter la du lastaj riveroj, sur kvazaŭ preskaŭinsulo; la duaj proksime de Aviles, kiuj laŭ la romana kutimo, sur kupraj lamenoj gravuris siajn intertraktatojn pri gastemeco kaj klienteco. Pri *Lucus Asturum*, *Gigia* kaj *Maliaca*, oni opinias, ke ili staris kie nun staras *Oviedo*, *Gijon* kaj *Villaviciosa*.

Ne riĉa je kulturo estis la teritorio, sed abunde fruktodona, neniu alia lando donis pli al la romana mastro per plej granda peno por la indiĝenoj en la internaĵo de la minejoj, la asturoj flaviĝis pro la peniga laboro, same flavaj ili, kiel la oro de ili elĉerpita, nur konante la riĉan metalon por ĝin malbeni. Pri la orabundeco de la lando parolas *Floro*, *Plinio*, *Lucano*, *Marcial*, *Claudiano* kaj *Silio Italico*, laŭdegante la laboron de la asturoj, la lasta per la jenaj versoj:

Astur avarus

Visceribus laceræ telluris mergitur imis

Et redit infelix effosso concolor auro


Astur'avare

Elfosas el la vundita terinternaĵo oron,


Ve, li, pro elfosad'akiras nur orkoloron.

La abruptaĵoj de la montaroj kaŝis feron, plumbon, kupron kaj minion. La sablo el la riverfluejoj entenis abunde oron kaj la lando donis el ĉi tiu metalo al Romo ĉiujare dum multe da tempo, kune kun *Galicia* kaj *Lusitania*, dekmil kilogramojn, sed la plej granda parto devenis de *Asturias*. La romanaj aris-tokratinaj altgrade ŝatis la asturajn linŝtofojn; la ĉevaloj, nomitaj *asturcones*, estis famaj pro sia dresemeco kaj rapideco kvan-kam malgrandaj. La historiistoj kaj la poetoj atestas kaj kantas la kuraĝon, militspertecon, viklecon kaj kurrapidecon de la asturoj, kiujn ili elpruvis per siaj militadoj al libereco kaj sen-dependemo.

Kiam la imperio de Konstantino renversigas, oni enkalkulis la asturojn en la tiam starigatan provincon *Galicia*, sed nek la *suevoj*, kiuj je la V.^a jarcento okupis la regionon, nek la vagantaj *vandaloj*, kiuj enpuŝis la antaŭajn en la montojn *Erbasios*, lasis postsignojn en la nuna Asturias, kie certe ili ne eniris, timante la kontraŭstaron de la indiĝenoj de la labirinta montarlando, en kiu ne estis grandaj urboj; tial, oni povas prave aserti, ke la asturoj reakiris sian liberecon, same kiel a kantabroj. Nur, kiam *Leovigildo* submetis la kantabrojn kaj al militis *Leon*, lia glavo svingiĝis kontraŭ la asturoj, sed nur je la komenco de la VII^a jarcento, regante Sisebuto, la asturoj ekpagas vasalimpostojn, ĉar generalo *Rechila* venkis ilin. Rilata submetiĝo, ĉar ofte estis ribeloj same, kiel ĉe la kantabroj, dum unu jarcento ne trafis tiri la asturojn de iliaj arbaroj kaj montaroj kaj fandiĝi kun la konkerintoj, nur la komuna danĝero pro la araba invado tion atingis.



Asturias.—Covadonga, La Báziliko de ĉe la Groto.



Asturas-Oviedo.—Galeria de la Klaüstro ôe la Katedralo

ENLANDA KRONIKO

Oviedo.—Vigle la samideanoj agadas ĉiel por la Nacia Kongreso; la kursoj bonege funkciadas; la Grupo «Verda Stelo» de la Ĥoraro «Ovetense», okaze de muzikfesto la 24^{an} de marto disdonis 1300 flugfo iojn «¿Qué es el Esperanto?» (Kio estas Esperanto), per kiu oni vidigas klare utilon k. t. p. de nia lingvo.

La Reĝa Delegito de Belaj Artoj, S-ro Aurelio del Llano Roza de Ampudia akompanos la Kongresanaron por klarigi monumentojn k. t. p., ĉar li sindoneme sin proponis por tio. Ni dankas tutkore lin.

Gijón.—Ĉi tie kiel en Oviedo ĉio iras antaŭen al plej granda sukcesigo de nia Nacia Kongreso: la kursoj disvolvigadas sukcese; pastro Fournier entuziasme sin preparas por kontentigi la Kongresanaron per sia prediko; oni laboras por la plej granda soleno de la ferma kunsido de nia Kongreso, por kio la Urbestraro tre bone helpas.

Noreña.—Entuziasme partoprenas la esperanto-kurson ĉi tieaj novaj adeptoj, promesante agrablegan akompanion al la ekskursonta Kongresanaro.

El Ferrol.—S-ro Salvador Olivan pli kaj pli sukcese daŭrigas la laboron, kaj ĵus li ekorganizis ĥoreton por kanti esperantajn kantojn kaj himnojn. La kursoj esperige funkciadas.

Orense.—«Esperantista Juneco» aktive laboras, por kio, konsciante la gravecon de la propagandfolio «¿Qué es el Esperanto?», ĝi eldonis milon kaj celas novajn milojn por ilin dissendi en la provinco al instruistoj, kuracistoj k. t. p.

Tocina (Sevilla).—S-ro Isidoro Díaz daŭrigas la laboron de la pasinta jaro, helpate entuziasme de la gesamideanoj de la Grupo «Ĝajeco kaj Laboro». Kvankam malfrue estas rimarkinde sciigi pri la grava esperanta festo okazinta ĉi tie la 4^{an} de novembro: la gelernintoj de la Grupo donacis riĉan silkan flagon al sia profesoro, S-ro Isidoro Díaz, ĝin brodis la lernantinoj, kaj oni okazigis gravan feston, en kiu pastro benis la flagon, iuj faris paroladojn pri Esperanto, pri la signifo de la donaco al la profesoro, kaj ĉi tiu por danki siajn disĉiplojn. Sekve estis lunĉo kaj je la vespero gaja fratiga vespermango. Ĉi tiu flago estis unu el tiuj belaj kaj riĉaj flagoj flirtantaj dum la Kongreso de Sevilla.

Madrid.—La Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj progresas rimarkinde kaŭze de la grava kaj tre taŭga laboro de Delegitoj kaj Vicdelegitoj sub gvidado de la centra Komitato. Sekvo estas granda entuziasmo ĉie, ke la novaj adeptoj fariĝas viglaj propagandistoj de Esperanto, ĉar ne sufiĉas al ili nur lerni la lingvon, kaptite de ĉi tiu la novaj adeptoj fariĝas apostoloj, kaj en Alcázar de San Juan, Almansa, Leon kaj Girona, ili ekorganizas Grupojn. La esperantistaj fervojistoj bone atentis, ke la Sekretario de la Ligo, S-ro Emilio del Barrio deĵoras: Compañía del Norte, Intervención, Sección de Compulsas G.V.

La Komitato kunvenas ĉiumerkrede je la dekunua vespere ĉe Bar Regio (strato Carrera de San Jerónimo). La samideanoj, trapasante Madridon, aŭ dezirante ion sin turni al la Sekretario, kaj sin kuraĝigu por aliri al Oviedo, ĉeesti la VIII^a Nacian Kongreson de la 14^a ĝis la 18^a de septembro de ĉi tiu jaro, kie okazos la Ĝenerala Kunveno de la Ligo.

La Grupo «Antaŭen» daŭrigas sian viglan laboron, la 3^{an} kaj 31^{an} de marto okazigis du festojn: unuan en la sidejo de la «Sociedad Deportiva Gas-Madrid», en kiu tre sukcese S-ro Gil Arrúe pritraktis la temon «Esperanto en la moderna vivo» per eleganta flua kaj simpla dirmaniero; duan, en la «Fomento de la Artes, en kiu mirinde, elokvente kaj facile S-ro Salvador Pérez klarigis «Esperanto grava kaj efika helpilo al tutmonda firma paco». «En ambaŭ okazoj fine la horeto de la Grupo kantis hispanajn kaj fremdajn popolkantojn. Ankaŭ la Grupo okazigis ĝeneralan kunvenon por aprobo de raporto, kalkuloj kaj modifoj al la regularo, kaj por pritrakti diversajn aliajn aferojn, la ĝenerala kunveno unuanime voĉdonis S-ron Mangada Rosenörn al lo Honora Prezidenteco de la Grupo.

Zaragoza.—Kun granda ĉeesto disvolvigadas ĉi tieaj kursoj kaj la Grupo «Fratego» bonege antaŭenigas la vojon de Esperanto. S-ro Ludoviko Campos ankaŭ malfernis alian kurson, kiu promesas viglajn samideanojn, «La Voz de Aragón», kaj aliaj gazetoj, pritraktas Esperanton. La Grupo «Fratego» petis, ke H. E. A. celu la aperigon esperantlingve la anoncojn pri kiuj ĵusa ordono de la Registaro parolas.

Cheste (Valencia).—Dank' al konstanta laboro de S-ro Mañez okazadas ĉi tie gravaj kulturfestoj per-pri kaj por Esperanto, kiuj efike influas la publikon por sperti la utilon de la lingvo,

profitante kolektivajn vojaĝojn al la naciaj Kongresoj; tial S-ro Mañez jam preparas la vojaĝon al Oviedo. Ĉiiflanke disvolviĝas la kursoj ne nur en Cheste, sed en najbaraj lokoj.

Gerona.—En la Fervojista Ateneo, placo de Tarril, dank' al la laboro de nia vigla samideano S-ro Jaime Miro, ĵus oni malfermis kurson por fervojistoj kaj esperantemuloj. La kurson sperte gvidas S-ro Ramón Casademont spite de sia kruela doloro pro perdo de dekjara filo mortigata de aŭtomobilo; tre rimarkinda kaj laŭdinda estas la konduto de S-ro Casademont, al kiu ĉi tiu gazeto esprimas la plej koran kondolencon je la nomo de la hispanaj esperantistoj.

Barcelona.—La 14^{an} de ĉi tiu monato ĉe la societejo de skulptistoj—strato Duran y Bas, 8—okazos ĝenerala kunveno de katalunaj esperantistoj por efektivigi la starigon de nova tutlanda organizaĵo, kiu laŭ la projektita regularo, havigos grandajn avantaĝojn. Grava cirkulero invitas al la kunveno kaj klarigas: ke delegito de ĉiu Grupo aŭ Societo, je la nomo de ĉi tiu, partoprenos rekte la regadon de la Federacio; ke la gazeto konigos al ĉiuj aferojn de la Federacio, ĉar ĉiuj ricevos ĝin; ke aro el aktivaj samideanoj kaj protektantoj de Barcelona atingos starigi sidejon, kie kursoj, festoj, kunvenoj, k. t. p., povos okazi, por la aktiva disvolvado de la Federacia vivo.

Propagandaj okazantaĵoj tre gravaj kaj seriozaj disvolviĝadas.

LA KAZOJ KAJ LA PROPOZICIOJ

DE

EDUARDO BENOT

(Daŭrigo)

II^a LECIONO

PRI L' AKUZATIVO

Tio kion oni manĝas; tio kion oni legas; tio kion oni legas; tio kion oni pagas; tio kion oni faras, estas Akuzativo.

JOHANO PAGAS LA PANON. Kio estas *tio, kion oni pagas?* La panon. Nu; *la panon* estas Akuzativo.

LA TAJLORO FARAS VESTON. Kio estas *tio, kion oni faras?* La veston. Nu; *la veston* estas Akuzativo.

SOCIEDAD ESPAÑOLA ESPERANTISTA

El Comité Central de Hispana Esperanto Asocio ha convenido, entre otros asuntos, en sus reuniones ordinarias: Aprobar las Actas del Congreso de Sevilla; que las Actas de los Congresos celebrados bajo los auspicios de H. E. A. lleven el visto bueno del Presidente, cuando éste no sea el Presidente efectivo del Congreso; que D. Antonio Jiménez Mora sea el promotor y organizador del VIII Congreso Español de Esperanto en Oviedo; aceptar a D. Salvador Oliván como Vocal representante de los samideanos de Galicia; nombrar la Comisión para estudiar las proposiciones presentadas ante el Congreso de Sevilla; invitar a los samideanos para que confirmen sus Vocales, o los elijan donde no los haya; rebajar a CIEN pesetas la cuota para tener voz y voto en la Representación Internacional Esperantista, y que éstos y los siguientes acuerdos sean publicados en HISPANA ESPERANTO, para que, por su mediación, lleguen a conocimiento de todos los consocios de H. E. A.

DE «LOS CASOS Y LAS ORACIONES»

DE

EDUARDO BENOT

(Continuación)

LECCION II

DEL ACUSATIVO

Lo que se come; lo que se escribe; lo que se lee; lo que se paga; lo que se escribe; lo que se hace, está en Acusativo.

JUAN PAGA EL PAN. ¿Qué es *lo que se paga*? El pan. Luego *el pan* está en acusativo.

EL SASTRE HACE UN VESTIDO. ¿Qué es *lo que se hace*? Un vestido. Luego *un vestido* es el acusativo.

Estas, do, Akuzativo tiu vorto per kiu oni respondas la demandon: kio estas *tio kion oni...*?

Diru kiuj vortoj, kaj kial, estas Nominativoj kaj Akuzativoj en la jena temo:

2^a. Temo

La generalo *manĝas* la panon. La infanino *legas* la gazeton. Ĉi tiu ĵurnalisto *verkas* la artikolojn. La instruistoj *tranĉas* la kraĵojn. La servistoj *tranĉas* la viandon. La generalo *skribas* la leterojn. La infanino *detranĉas* la florojn. Mia fratino *pagas* la botojn. Johano *pruntedonas* la librojn. La taojlo *faras* la veston. La servistino *flekas* la robon. La birdoj *pikas* la frukton. La lupo *mordas* la hundon. La hundo *mordas* la lupon.

Faru la disĉiplo iujn ekzemplojn kiel la antaŭajn.

Demandu: Kiu estas *tiu kiu* manĝas? La generalo. Nu; kiu estas la Nominativo? La generalo. Kaj kio estas *tio, kion oni* manĝas? La panon. Nu; kiu estas la Akuzativo? La panon. Kial? Ĉar estas *tio, kion oni* manĝas? Faru anologajn demandojn por la ceteraj ekzemploj.

III^a LECIONO

PRI LA DATIVO

Al kiu oni donacos; *al kiu oni* pagas; *al kiu oni* skribas; *al kiu oni* sendas; *al kiu oni* pruntedonas; *al kiu oni* donas; k. c. estas Dativo.

MI DONAS PANON AL VIRO. *Al kiu oni* donas la panon? Al viro. Nu; *al viro* estas Dativo.

MI PAROLAS AL PETRO. *Al kiu oni* parolas? Al Petro. Nu; *al Petro* estas Dativo.

JOHANO DONACIS KOLRINGON AL SIA FRATINO. *Al kiu oni* donacis kolringon? Al sia fratino. Nu; *al sia fratino* estas Dativo.

Tial estas Dativo tiu vorto, per kiu oni respondas la demandon: *al kiu oni...*?

Rimarko—La Dativo iras ĉiam post la prepozicion *al*.

Diru kiu vorto estas Dativo, kaj kial, en la jenaj propozicioj. Diru poste la Nominativojn kaj Akuzativojn

Está, pues, en acusativo aquella palabra con que se responde a la pregunta ¿qué es *lo que se...*?

Dígase cuáles palabras, y por qué, están en nominativo y en acusativo en el tema siguiente.

Tema segundo

El general *come* el pan. La niña *lee* la «Gaceta». Este periodista *escribe* los artículos. Los maestros *cortan* los lápices. Los criados *cortan* la carne. El general *escribe* las cartas. La niña *troncha* las flores. Mi hermana *paga* las botas. Juan *presta* los libros. El sastre *hace* el vestido. La criada *remienda* la bata. Los pájaros *pican* la fruta. El lobo *muerde* al perro. El perro *muerde* al lobo.

Ponga el discípulo algunos ejemplos como los anteriores.

Pregúntese: ¿Quién es *quien* come? El general. Luego, ¿cuál es el nominativo? *El general*. Y ¿qué es *lo que se* come? El pan. Luego, ¿cuál es el acusativo? *El pan*. ¿Por qué? Porque es *lo que se* come. Háganse análogas preguntas para los demás ejemplos.

LECCION III

DEL DATIVO

¿A *quién se le* regala? ¿A *quién se le* paga? ¿A *quién se le* escribe? ¿A *quién se le* envía? ¿A *quién se le* presta? ¿A *quién se le* da?, etc., está en dativo.

DOY PAN AL HOMBRE. ¿A *quién se le* da el pan? Al hombre. Luego *al hombre* está en dativo.

HABEO A PEDRO. ¿A *quién se le* habla? A Pedro. Luego *a Pedro* está en dativo.

JUAN REGALÓ UN COLLAR A SU HERMANA. ¿A *quién se le* regaló un collar? A su hermana. Luego *a su hermana* es dativo.

Está, pues, en dativo aquella palabra con que se responde a la pregunta ¿a *quién se le...*?

Observación. — Nótese que el dativo va siempre precedido de la preposición *a*.

Dígase cuál palabra está en dativo, y por qué, en las cláusulas siguientes. Díganse luego los nominativos y los acusativos.

3^a Temo

La kuiristo *donas* la viandon al la hundo. La kolonelo *pagas* la botojn al la ŝuisto. Ŝi *pruntedonas* la monon al la servistino. La edzo *donacas* la konfitaĵojn al viaj gefiloj. La grafo *skribas* al mia frato leterojn. Mi *mallaŭdis* tiun malbonaĵon. Iu *estas respondata* tion al la komisaro. La tajloro *faras* la vestojn al la lakeo. La ĉarpentistoj *sendas* la apogseĝojn al mia onklino. La fiŝkaptisto *estis* doninta la kankrojn al la kuiristino.

Faru ekzemplojn kiel la antaŭajn.

Restudu ĉi tiujn tri lecionojn; kaj difinu Nominativojn, Akuzativojn kaj Dativojn la disĉiplo.

PATRINO, MI FORIRAS...

DE

RABINDRANATH TAGORE

Mi foriras, patrino; alvenis la horo... Kiam ĉe la paliganta ombreco de la tagiĝo izolita, viaj brakoj serĉu vian fileton en la lito, mi vin diros: «La infano ne estas tie»... Panjo, mi foriras...

Mi fariĝos kvazaŭ milda venteto por karesi vin. Mi estos la aerglobeto ĉe la akvo, kiam vi vin banos, por vin kisi kaj ŝmacadi senlace. Dum la ventegaj noktoj, kiam la pluvo frapadas foliojn, vi aŭdos, de via lito, mian mallaŭtan murmureton, kaj la fulmo, enirante en vian ĉambron tra la malfermata fenestro kaj lumigante ĝin, estos kvazaŭ mia rido. Se pensante en vian infanon, vi pasigas nedormeme la noktajn horojn, mi, de la stelo, al vi kantos: «Dormu, dormu!» Mi estos la perdita lunradio trafanta vian liton kaj mi min kuŝigos ĉe via brusto dum vi dormas. Mi fariĝos via dormo, kaj tra la fendeto inter viaj palpebroj, mi min enprofundigos en la abismon de via ripozo; kaj kiam, timigate vi vekigos kaj rigardos ĉirkaŭen, mi forflugos, kiel tremanta lampiro, al la ombro. Je la granda festo, kiam venos ludi ĉe ni la infanojn de l'najbaro, mi estos la muziko de la fluto, kaj mi batetados tutan tagon ĉe via koro. Onknjo alportos donacaĵojn kaj ŝi demandas: «Kie estas la infano?» Vi, panjo, diros al ŝi: «Li estas ĉe la pupiloj de miaj okuloj, ĉe mia korpo, ĉe mia animo...»

Tema tercero

El cocinero *da* la carne al perro. El coronel *paga* las botas al zapatero. Ella *presta* dinero a la criada. El marido *regala* los dulces a tus hijos. El conde *escribe* a mi hermano las cartas. *Censuró* esa infamia. Alguien *ha respondido* eso al comisario. El sastre *hace* los vestidos al lacayo. Los carpinteros *envían* los sillones a mi tía. El pescador *había dado* los cangrejos a la cocinera.

Fórmense ejemplos como los anteriores.

Repásense estas tres lecciones, y, además de los nominativos, acusativos y dativos, designe el discípulo los verbos.

MADRE, ME VOY...

DE

RABINDRANATH TAGORE

Me voy, madre; es la hora... Cuando en la pálida obscuridad del amanecer solitario tus brazos busquen a tu hijito en el lecho, yo te diré: «El niño no está ahí»... Madre, me voy...

Me convertiré en una suave brisa para acariciarte. Seré la burbuja de aire en el agua, cuando te bañes, para besarte y besarte sin descanso. En las noches huracanadas, cuando la lluvia golpea las hojas, oirás desde tu cama mi susurro, y mi reír brillará en el relámpago que ilumine tu alcoba por la ventana abierta. Si, pensando en tu niño, te pasas las horas de la noche desvelada, yo, desde la estrella, te cantaré: «Duerme, duerme». Entraré en el rayo de luna perdido en tu lecho y me echaré en tu regazo mientras duermas. Me trocaré en tu sueño y por la rendija de tus párpados me abismaré en la sima de tu reposo; y cuando, asustada, te despiertes y mires en torno, saldré volando, como una temblorosa luciérnaga, a la sombra. En la fiesta grande, cuando vengán a jugar a casa los niños del vecino, fluiré yo en la música de la flauta y latiré todo el día en tu corazón. Tía traerá regalos y preguntará: «¿Y el niño, dónde está?» Tú, madre, le dirás: «Está en las niñas de mis ojos, está en mi cuerpo, está en mi alma...»

GUSTAVO A. BECQUER

LIII^a RIMO

Rependigos de sur via balkono
Sian neston malhela hirundin',
Kaj denove, per flugil' sur vitraĵon
Ludante vokos vin;
Kiu flugon malakcelis, ve!, antaŭ
Via belo kaj mia la feliĉ';
Tiu, kiu lernis niajn la nomojn,
Ne venos... jam en nin!

Murojn de l' ĝardeno via reramos
Foliplena kaj densa lonicer',
Eĉ malfermos siajn florojn pli belajn
Je l' fino de l' vesper',
Tiu plena je tremanta la roso,
Por ni kvazaŭ la larmoj de l' sufer'
Kiujn vidis ni falantaj, taglarmoj,
Ne ramos... for esper'!

Jes, denove viaj aŭdoj aŭskultos
Kiel ardajn parolojn diras am';
Kaj ĉe l' via koro, eble, naskiĝos
Denove iu flam';
Vin mi mute, en ekstaz', surgenuen,
Kiel, Dion, adoris ĉe l' altar';
Kiel amo mia por vi, ne dubu,
Neniu... brulos jam!

«El Moderna Hispana Parnaso» kolekto el tradukitaj hispanaj
versaĵoj de famaj poetoj, de Julio Mangada Rosenörn.

GUSTAVO A. BECQUER

RIMA LIII


Volverán las oscuras golondrinas
En tu balcón sus nidos a colgar,
Y, otra vez, con el ala en sus cristales
Jugando llamarán;
Pero aquéllas que el vuelo refrenaban
Tu hermosura y mi dicha a contemplar,
Aquéllas que aprendieron nuestros nombres...
Esas... ¡no volverán!

* * *

Volverán las tupidas madreselvas
De tu jardín las tapias a escalar,
Y, otra vez, a la tarde, aún más hermosas,
Sus flores se abrirán;
Pero aquéllas, cuajadas de rocío,
Cuyas gotas mirábamos temblar
Y caer, como lágrimas del día...
Esas... ¡no volverán!

* * *

Volverán del amor en tus oídos
Las palabras ardientes a sonar;
Tu corazón de su profundo sueño
Tal vez despertará;
Pero mudo y absorto y de rodillas,
Como se adora a Dios ante su altar,
Como yo te he querido..., desengáñate,
¡Así no te querrán!



Asturias.—Tipa vidaño de Cudillero.

XXI CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO

BUDAPEST, DEL 2 AL 9 DE AGOSTO DE 1929

Dirección: Esperanto-Congreso, Budapest

El Comité Local del Congreso saluda al esperantismo universal y le invita fraternalmente a participar en esta grandiosa manifestación de la aproximación de los pueblos. Este Congreso en la Europa central, en lugar vecino de numerosos pueblos pequeños con diversidad extraordinaria de lenguas, será un éxito grandioso para el triunfo del Esperanto por las razones apuntadas, aportando, por la utilidad de la lengua para la intercomprensión, una nueva y firme base de nuestro movimiento.

Componen dicho Comité: el doctor D. Samu Patai, Consejero Mayor del Gobierno, como presidente de honor; el señor D. József de Mihalik, profesor de la Escuela Normal de Maestras, como presidente; el doctor en Medicina, Leon Lorand, como vicepresidente; el señor D. István Nagy Molnar, Consejero Mayor de Cuentas del Ministerio, como vicepresidente; el señor D. Pablo Tolnai, comerciante, como secretario; el señor D. Pablo Balkanyi, empleado de Banca, como secretario; el señor Elek Tolnai, comerciante, como cajero; la señora Elinia Bencze, como protocolaria, y los señores Julio Baghy, Lajos Kobény, doctor Giula Lukács, doctor József Szilágyi, doctor József Takács e István Zöldy, como vocales.

Las *hojas de adhesión* son distribuidas por medio de la Prensa esperantista y de los delegados de la Asociación Universal Esperantista. El Comité las manda a todo el que se las pida.

